

Respondo al leteroj de aŭskultantoj, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.01.09

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-160/Radiokasedo-160-B-1000-1986-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-leteroj-de-auskultantoj-2.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Kiel anoncite, ni daŭrigas nian respondadon al la leteroj, kiujn ni ricevis dum la pasinta jaro. Ĉifoje ni elektis kiel labormetodon la tutsimplan alfabetan ordon de la skribintoj. S-ro Erik BENEŜ en Dinan, Francio, havas bedaŭron:

A.- "Mi bedaŭris, ke estis tiom da muziko je la fino inter 18h40 kaj 18h45."

Cl.- Pluraj ŝatus ricevi iom pli longajn esperanto-elsendojn en kiuj la muzikaĵoj integriĝus. Tia progreso fakte spegulus grandan kreskon de la nombro de la ricevataj korespondataĵoj, kiuj estas la sola reala atestado de la ekzisto mem de la aŭskultantoj. Tial estas grave, ke ne nur aktivu la parolistoj, sed ankaŭ la aŭskultantoj. La poŝtkarto de Erik BENEŜ turnas niajn rigardojn al Sankta Francisko el Asizo, kaj komence de tiu ĉi nova jaro, ni ŝatas ripeti la komencon de lia simpla preĝo:

A.- "Ho Sinjoro, faru el mi ilon de via paco."

Cl.- Ni zorge konservas tiujn esperantlingvajn poŝtkartojn riĉigante la kolekton de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia ([CDELI](#)) en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ni nun salutu s-ran Andres BICKEL en Versoix, Svislando, kiu havigis al ni sciigojn pri la loka poresperanta aktiveco. Okaze de la 18-a Semajno de Internacia Amikeco skribis al ni dudeko da aŭskultantoj de la Bolonja Esperanto-Grupo, Italio, kies subskribojn ni malfacile deĉifras. Al Mario AMADU kaj Iside GRAZIANI, kiuj verŝajne estas la grupestroj, ni esprimas niajn bondezirojn por la tuta Bologna Esperanto-Grupo. Ni restu en Italio. D-ro Serio BOSCHIN en Treviso raportas pri religia renkontiĝo, kiu kunigis 27 esperantistojn el Treviso, Udine, Verona, Vicenza, Mestre kaj Venezia. Ili profitis la okazon por skribi:

A.- "ĉe ni viaj elsendoj estas tre bone aŭdeblaj, dankon kaj gratulojn por via esperanta agado."

Cl.- Espereble pluraj el tiuj subskribintoj aŭdas nin hodiaŭ. Du leterojn ni ricevis de s-ro Maurice BORDESSOULLE en Berck, Francio. Ni citu kelkajn erojn:

A.- "Mi aŭdas vin... tiel ofte kiel mi povas - Bedaŭrinde, mia maljuneco kaj mia malbona sanstato ne helpas min... Mi tiel aŭdis pri la malfacilaĵoj de UNESKO, raporton pri la organo UNO kaj NI... En alia elsendo mi aŭdis kasedon pri Britujo kaj aŭdis "Big Ben" ... Tiun kasedon faris Peter SCHILPEROORD...

Cl.- ...al kies intervjuo ĝuste aludas Maurice BORDESSOULLE, kaj li daŭrigas:

A.- Mi kredas, ke lia kurso por komencantoj "Liza kaj Paŭlo" interesos multajn aŭdantojn.

Cl.- Ne povante plu partopreni kongresojn pro maljuneco kaj malsano, s-ro Maurice BORDESSOULLE ŝatas aŭdi raportojn pri esperanto-aranĝoj. Por li, kiel por multaj aliaj, la

radio estas la reala ligo kun esperanto. Ĝuste pri la intervjuoj kun Peter SCHILPEROORD skribis s-ro John BROWNLEE en Londono:

A.- "Nur por diri, ke mi aŭskultis kun granda intereso la interparoladon kun Peter SCHILPEROORD pri la kasedo "Londono en Sono" kaj antaŭĝuas la du ceterajn intervjuojn. Parenteze sur tiu kasedo kantas "La Londona Esperanto-horo" pri kio mi respondecas."

Cl.- Ni gratulas John BROWNLEE pro tiu korusa aktiveco. El Latvia Sovetunio ni ricevis leteron de s-ino Mirdza BURGMEISTER en Riga:

A.- "Jam plurajn jarojn de temp' al tempo mi aŭskultas vian stacion, se mi sukcesas ĝin kapti... Sed la unuan leteron mi sendas al vi nur hodiaŭ. ..Viaj disaŭdigoj estas tre altnivelaj kaj altkvalitaj...

Cl.- Espereble hodiaŭ povis aŭdi nin nia samideanino Mirdza Burgmeister en Riga, urbo kiun ni ekkonatiĝis dankal ŝia poŝtkarto, kiu montras la ĉefponton Gorki super la rivero Daugava. Vidu, per la ricevita poŝtkarto ni eklernas geografion. S-ro Jean CALAMY en Gemenos, Francio, skribis trifoje:

A.- "Jam de longe mi volis sciigi al vi la bonegan aŭskulteblecon de Svisa Radio Internacia en mia regiono. Tre ofte mi sukcesas registri viajn elsendojn: moderna Cseh Metodo, Aŭgsburga Kongreso, Romanĉa lingvo, Paroladoj kun Regulo Perez kaj István Szerdahelyi, ktp.... Mi devas diri, ke mi lernas mem esperanton de kvar jaroj; tamen, malgraŭ miaj mankoj mi aŭdacis antaŭ nelonge malfermi kurseton por komencantoj. Mi do volas pruvi al miaj lernantoj, ke post mallonga studado oni povas paroli flue kaj bone.

Cl.- Por tion ĉi pruvi Jean CALAMY registris la intervjuon, kiun mi realigis kun la junulo Pascal DUBOURG, al kiu li vane provis skribi. Tra nia kanalo li povos lin atingi. S-ro Paolo CERRETINI en Pisa, Italio skribis informiĝante pri niaj elsendhoroj. Ni esperas, ke li ricevis ĉiujn deziratajn informojn, kaj ke hodiaŭ li onde rendevuas kun ni. S-ino B. CHEVERY en Baugé, Francio, regule donas al ni sciigojn pri la aktiveco de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Kastelo Gresillon. Ni atentigas niajn aŭskultantojn pri la venontaj aranĝoj:

A.- Fine de marto kaj komence de aprilo okazos pedagogia seminario kaj internacia renkonto de infanoj, meze de junio okazos internacia renkonto kaj la someraj kursoj kaj prelegoj komenciĝos fine de la sama monato kaj konkludiĝos nur fine de aŭgusto.

Cl.- Plenan sukceson al ĉiuj tiuj aranĝoj ni deziras. S-ro Pere CUBERONS en Sabadell, Hispanio gratulas pri sabata elsendo, kiun ni dediĉis al la instruado de la esperanto-gramatiko. Kaj li gratulas nin je la nomo de la Esperanto-Centro en Sabadell, kiun li gvidas. Tion ĉi li faras per bela poŝtkarto de la 21-a Kataluna Kongreso de Esperanto okazinta en Sant Cugat del Vallès inter la 31-a de oktobro kaj la 3-a de novembro 1985. S-ro CHALM en Le Haure, Francio tute simple salutas dirante:

A.- "Mi prezentas al vi miajn plej bonajn bondezirojn."

Cl.- Ni reciprokas la salutvortojn. S-ro Pierre CUGNY en Dijon, Francio skribas:

A.- "Dum pasinta novembro, kun kelkaj geamikoj, mi aŭskultis viajn ĉiam tre interesajn elsendojn en esperanto."

Cl.- Sekvas interesaj aŭdraportoj pri kiuj ni dankas. Ni dankas s-ron CUGNY pro liaj 3 tiurilataj leteroj. Ĉiam en Francio ni salutas s-inon Renée CORREY kiu aŭskultas nin en Besançon, kaj s-ron Jean CRUCHON en Longjumeau. Ni konkludas nian hodiaŭan babiladon kun niaj geaŭdantoj salutante s-ron David CURTIS en Weston-ĉe-Mar, Britio. Aŭdu lian skribaĵon:

A.- "Mi ne certas pri via identeco, ĉar mi estas tonsurda, sed se vi estas Claude GACOND, mi bone konas vin pro semajno pasigita en La Chaux-de-Fonds en somero 1984-a kaj tre admiras vin. Se jes, eble vi memoros ĉi tiun vilaĝon Neĵlsi, nun moderna urbo, kiun mi vizitas regule kiel veturanta instruisto por nesukcesemaj eklegantoj.

Cl.- Fakte okaze de prelegvojaĝo en Britio ni vizitis la vilaĝon Neĵlsi. Kaj s-ro David CURTIS mencias alian hazardan aferon:

A.- "Plua rilataĵo inter ni estas ke mia edzino konas svisinon, s-ino Lewis (Luis) en loka branĉo de nacia asocio por virinoj. Aŭdinte ke mi jam vizitis vian bonegan kursejon, ŝi komentis kun ĝojo, ke ŝia kuzino, s-ino Calame, loĝas tre apude de la kursejo - en unu el la domoj en la vojeto malantaŭ ĝi. Do, unu el niaj geamikoj konas unu el viaj najbaroj."

Cl.- Jes, la mondo tamen estas malgranda. Fakte tiu s-ino Calame estas luantino de loĝejo, kiu apartenas al la Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista. Ni raportos al ŝi pri tiu perradia rilato.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La leterkesto ankoraŭ tre plenas. Do aliajn elsendojn ni dediĉos al la respondado de la leteroj ricevitaĵ en la pasinta jaro.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo !